20 Aprilo 1906. DUA JARO N° 8 (26)

LA ALĜERIA STELO

OFICIALA ORGANO

De la Grupo Esperantista de Alĝero

KAJ DE LA NORDAFRIKO

Oficiala Parto

Grupo Esperantista de Alĝero

KAJ DE LA NORDAFRIKO

RÉUNION DU COMITÉ DU 13 AVRIL 1906

La séance est ouverte à 6 heures du soir, sous la présidence de M. Aubert.

Sont présents : MM. Aubert, président ; Roux, secrétaire général ; Moinard, trésorier ; Landes et Foussat, membres.

Le Comité décide que le prochain thé espérantiste aura lieu à l'Excelsior, le 26 avril, à 5 heures et demie. Les membres du groupe sont priés de vouloir bien y assister. Les invités seront admis.

Des causeries sur un thème fixé à l'avance auront lieu tous les samedis, de 5 à 7 heures du soir, au local du groupe, 4, rue du Marché. La première de ces causeries est fixée au 21 avril courant : on y parlera de l'Esperanto comme moyen d'information. Le sujet de la prochaine causerie sera fixé à la fin de la séance.

Afin de rendre plus intéressante l'exposition permanente ouverte au local du groupe, le Comité invite tous les espérantistes à lui adresser en communication les documents intéressants qui seraient en leur possession. Ces documents seront pris en charge et conservés très soigneusement. Ils seront rendus à leurs propriétaires dans un délai très rapproché.

A l'occasion du Congrès de Boulogne, les espérantistes ont obtenu des Compagnies de chemins de fer une réduction de 50 pour cent sur le prix du voyage. Afin d'obtenir les mêmes avantages pour les espérantistes qui se rendront au Congrès de Genève, le Comité engage les intéressés à se faire inscrire au plus tôt au local du groupe. Des démarches vont être tentées auprès des Compagnies de navigation pour obtenir une réduction de même importance sur le prix des passages.

Le Comité décide de participer à l'exposition de Genève par l'envoi d'une collection de cartes postales algériennes sur lesquelles seront écrits divers renseignements relatifs au mouvement espérantiste en Algérie.

Le Comité approuve la proposition faite par les espérantistes allemands de célébrer tous les ans, le 15 décembre, jour anniversaire de la naissance du D-r Zamenhof, une fête universelle de l'Esperanto.

PRI LA PROPONOJ DE S-RO KORNERUP

Tial ke la proponoj de S-ro Thorvald Kornerup interesas la tutan esperantistaron, ni enpresas esperante la decidon de la Komitato de la Alĝera Grupo pri tiuj proponoj:

La komitatanoj, ekzameninte la diversajn proponojn faritajn de S ro Kornerup pri la revizio de la lingvo Esperanto, ĉefe pri la supersignitaj literoj, kiujn, laŭ la opinio de S-ro Kornerup, oni devus anstataŭi per aliaj literoj, decidas, ke oni ne povas, eĉ ne devas akcepti iajn ajn ŝanĝojn en la skribmaniero de Esperanto. Oni nune devas, kontraŭe, konservi la Esperantan ortografion tian, kia ĝi estas. Ĉiu ŝanĝo alfarota al la zamenhofa lingvo nepre forigus el Esperanto multajn esperantistojn.

Konsekvence, la Komitato de la Grupo Esperantista de Alĝero kaj de la Nordafriko petas la anojn de la Lingva Komitato ke ili bonvolu rifuzi ĉiujn proponitajn aŭ proponotajn ŝanĝojn en la esperanta skribmaniero.

STELETO.

N. D. L. R. — Niavice, ni sciigas tie ĉi, ke ni pli preferus tute forlasi Esperanton ol akcepti iajn ŝanĝojn en ĝia skribmaniero. Ni klopodu propagandi kaj disvastigi la zamenhofan internacian ligilon, sed ni ne klopodu ĝin aliformigi.

Neoficiala Parto

DIVERSAĴOJ

ESPERANTO-ĴURNLO.

S-ro P. Berthelot, administranto de l' ĵurnalo « Esperanto », sciigas nin, ke de nun la ĵurnalo estas transdonata al akcia societo, kaj eliros baldaŭ denove kaj senhalte.

ESPERO KATOLIKA.

Tiu revuo estas nun bela 32-paĝa eldonaĵo kaj estas malferm ata al ĉiuj. Ĝi estas tute esperante redaktata.

La jarabonprezoj estas 5 frankoj en fremdlandoj kaj 4 frankoj en Franclando.

ESPERANTA LIGILO.

Monata revuo en reliefpunktoj por blinduloj. — 3 fr. jare por ĉiu lando. — Direktoro Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris. — Tria jaro. — N-ro 3, Marto 1906. — ENHAVO : 1. Avizo, Th. Cart ; 2. Problemo ; 3. Letero el Bostono ; 4. Humoraĵo ; 5. Politika kroniko (Guilbeau) ; 6. Poezio : Post la batalo (Boirac) ; 7. Proverboj. — Felietono : Parolado de D-ro Zamenhof en Boulogne (finiĝo).

ESPERANTA RADIKARO.

Ni ricevis ekzempleron de la Esperanta Radikaro kiu estas la « nigra » eldono de verketo punktreliefe presita por blinduloj.

En publikaj kursoj ĝi povos, spite sia stranga elŝajno, esti tre utila al profesoroj kaj lernantoj. — Ĝi estas vendata nur po 60 cent. por la propagando de Esperanto inter blinduloj.

Clef du Radikaro (Radikara Ŝlosilo) estas jam eldonata kaj estas vendata ankaŭ por blinduloj, po 25 cent.

Oni sin turnu al la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

LE « PETIT PARISIEN » ET L'ESPERANTO.

Le « Petit Parisien » devient un fervent propagateur de l'Esperanto. Nous lisons en effet, dans le numéro du 30 mars dernier, les quelques lignes suivantes, extraites d'un article publié par ce journal et intitulé : L'ESPERANTO :

« Afin de l'aider dans sa tâche et contribuer également au développement de l'Esperanto, le « Petit Parisien » a résolu de prêter son appui aux espérantistes, de leur ouvrir, autant de fois qu'il leur sera nécessaire, ses colonnes pour la publication de renseignements concernant les groupes essaimés sur notre territoire (réunions, cours, etc.) ».

Et, plus loin, la bonne nouvelle suivante :

« En conformité avec la proposition de M. Hénaffe, conseiller municipal, la direction de l'enseignement primaire du département de la Seine a décidé d'introduire officiellement l'enseignement de l'Esperanto dans les écoles primaires supérieures de la ville de Paris. »

Nous remercions bien sincèrement notre grand confrère parisien de sa bonne propagande pour l'Esperanto.

SERĈULO.

DUA UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO

Kiel oni jam scias, la dua Universala Kongreso okazos en Ĝenevo, de la 28-a de Aŭgusto ĝis la 6-a de septembro 1906.

Ni ricevis el la Loka Organiza Komitato la Unuan Cirkuleron pri la programo de tiu kongreso.

PROGRAMO DE L' KONGRESO

Mardon, 28 aŭgusto. — Vespere : Oficiala malferma ceremonio kaj koncerto

Merkredon 29. — Matene : Preparaj kunvenoj. — Posttagmeze : Unua ĝenerala kunveno. — Vespere : Teatra vesperfesto.

Jaŭdon 30. — Matene : Ŝipveturado sur la Lemana Lago, kun oficiala Festeno en Vevey (Festenkarto : 5 frankoj).

Vendredon 30. — Matene : Dua ĝenerala kunveno. — Posttagmeze : Akcepto ĉe l' Parko de S-roj Thudicum, en "La Châtelaine". — Vespere : Balo.

Sabaton 1 septembro. — Posttagmeze : Tria ĝenerala kunveno. — Vespere : Oficiala ferma ceremonio kaj koncerto.

3, 4, 5 septembro. — Vojaĝo tra Svisujo : Genève, Montreux-Oberland, Spiez, Interlaken, Murren, Berne, Genève.

Verda Karto (10 fr.). — Oni de nun povas aĉeti la oficialan kongreskarton kiu kostas 10 frankojn kaj donas rajton senpage ĉeesti kaj voĉdoni en ĉiuj kunvenoj de la Kongreso, partopreni je ĉiuj festoj (ankaŭ la ŝipveturado sur la lago), ricevi ĉiujn necesajn dokumentajn por la diskutoj kaj laboroj de l' Kongreso kaj la adresaron de l' kongresanoj.

Blanka Karto (5 fr.). — Ĉiu persono jan posedanta 10-frankan verdan karton havos rajton aĉeti por la anoj de sia familio unu, du, tri aŭ maksimume kvar blankajn kartojn, kiuj kostas fr. 5 kaj donas samajn rajtojn kiel la verdaj kartoj, esceptinte la rajton voĉdoni kaj ricevi dokumentojn kaj adresaron.

KONKURSO PRI AFIŜOJ KAJ POŜTKARTOJ

Por havi plej arte ilustritan afiŝon, la loka Organiza Komitato malfermas konkurson inter la esperantistaj artistoj. La formato

de l' afiŝo estas 1 m. × 1 m. 30. La konkursantoj devos rezervi grandan lokon tra la desegnaĵo, sufiĉan por la posta surpreso de la teksto : Dua Uiversala Kongreso de Esperanto, Programo, k. t. p. La ilustraĵo povas esti du- aŭ tri-kolora. Ĉiuj, kiuj deziras partopreni en la konkurso, devas sendi sian projekton al la oficejo de la Kongreso antaŭ la 20 de majo, skribinte sur la dorso de sia projektfolio ian devizon kiun ili reskribos sur fermita koverto entenanta sian nomon kaj precizan adreson.

Premio da 50 frankoj estos donata al la aŭtoro de la akceptota projekto. La desegnaĵo povos utili ankaŭ por kongresa poŝtkarto.!

EKSPOZICIO

Granda Ekspozicio estos organizata ; ĉiuj esperantistaj grupoj estas petataj sendi kiel eble plej multajn dokumentojn al la Kongresa Oficejo. Specialan cirkuleron petu la interesatoj.

Aliĝojn, monon, korespondaĵojn, k. t. p., unuvorte ĉion, kio koncernas la Kongreson oni sendu nur al la KONGRESA OFICEJO, 15, Quai de l'Ile, GENÈVE.

LA BESTOJ ANTAŬ JUPITERO

ELTIRITA DE FRANCA FABLARO

Iam la bona Jupitero ordonis kunvenon al la piedo de sia trono de ĉiuj bestoj de l' tero por ke li korektigu ĉian difekton kiun trovis kiu ajn en sia formo.

Kompreneble, li komencis je la simio, kredante ke tiu-ĉi besto inter ĉiuj, havis la plej grandan kaŭzon por plendo.

— Rigardu tiujn bestojn, li diris, komparu ilian belecon je la via, ĉu vi estas kontenta ?

La simio sin turnis, palpebrumis, sulkigis la brovojn kaj respondis :

— Ho, potenca reĝo ! mi devas laŭdegi viajn favorojn ; ĉu mi ne estas kreita laŭ la formo de la homo, la plej perfekta el ĉiuj kreitaĵoj ? Via Reĝa Moŝto invitas min kompari : mi ĝojas ke mi tute ne similas mian fraton la urson ; vere li estas nur skizita ; estus bone, ke li daŭrigus loĝi en soleco, kaj montrus sin kiel eble plej malofte.

Poste en vico venis la urso. Oni kredis, ke li plendus. Neniel. Li fanfaronis pri sia korpo, kaj kritikis la elefanton :

— Peza amaso! li diris, kun mallonga vosto kaj du longaj oreloj.

L' elefanto ne parolis pli sage. Li tute malaprobis la grandecon de la baleno.

La formiko diris, ke multe da insektoj estas tro malgrandaj.

Fine, ĉiu besto estis kontentiga pri si mem, kaj trovis ion pli aŭ malpli malrektan ĉe la aliaj.

Kion aŭdus ni, se la homoj estus tiel kunvokitaj ?

Ni havas okulojn por vidi la difektojn kaj erarojn de niaj najbaroj, sed ni estas blindaj pri niaj kulpoj.

ANONIME.

SONĜO DE ESPERANTISTO

Poezio eltirita de l' Sveda ĵurnalo *Esperantisten*

Mi vidis en sonĝo la mondon
per l' ago de ni kunigatan,
la teron, l' aeron kaj l' ondon
farantajn la pacon, la fratan ; —

helpantaj la fortoj naturaj
nur servis la homan progreson,
kaj la militadoj teruraj
jam falis en longan forgeson.

Mi vidis feliĉan homaron,
ne plu inter si batalantan,
serĉantan nur l' amon, la klaron,
la celon de l' vivo vidantan :

mi vidis de l' tero la rondon
en pac' harmonian kaj fratan : —
mi vidis en sonĝo la mondon
per l' ago de ni kunigatan.

Ho fratoj ! helpinda afero
per l' homoj ne ĉiam neĝos !
— per ni, jes per ni sur la tero
la sonĝo ja nun realiĝos !

ALCESTE.

Vojaĝo al Okcidentafrikaj Bordoj

DUA PARTO

KONAKRI'O KAJ LA FRANCA GINEO

Mi ne intencas skribi la tute detalan priskribon de Franca Gineo, sed nur doni kelkajn sciigojn pri tiu lando kaj ĝiaj loĝantoj, pri la moroj, kutimoj, loĝejoj kaj kostumoj de la enlanduloj, pri la ceremonioj, kiujn ili faras, kaj pri la bestaro kaj la kreskaĵaro de tiu-ĉi lando.

Konakri'o, ĉefurbo de la kolonio, kuŝas je 10 gradoj nordlarĝe kaj 45 gradoj okcidentlonge, sur insulo « Tombo », kiu, post la konstruo de l' fervojo, estas interligita al kontinento per digo, kaj, nun, la insulo fariĝis duoninsulo.

Kiam mi elŝipiĝis en Konakri'on, dum majo de 1900, la urbo enhavis malmulte da konstruaĵoj, ĉar estis nur la domo de la publikaj laboroj, la palaco de la registaro, la hospitalo, la katolika kaj protestanta preĝejoj, la lernejoj kaj kelkaj komercaj kontoroj ; lignaj barakoj, kiuj ŝirmis Sirianajn vendistojn, aŭ Siera-Leonajn nigrulojn, fine, multaj enlandaj dometoj.

Sed, post la komenco de la laboroj pri la konstruo de la fervojo, fariĝis granda komerca movo ĉe Konakri'o ; rapide, multe da domoj kaj da palacoj estis konstruitaj ; tial, unu jaron post mia alveno, la urbo estis duobligita, kaj nun, Konakri'o havas du publikajn vendejojn, belan protestantan lernejon, du katolikajn lernejojn, du preĝejojn, vastegan kaj komfortan hospitalon, multajn komercajn kontorojn, unu bankon kaj belegan akvujon, kies akvo alvenas el pli ol 50 kilometroj, per akvokonduko speciale konstruita ; fine, la urbo enhavas belajn aleojn, kiujn borderas arboj kun densa foliaro, larĝajn kaj vastajn stratojn, kaj publikajn placon, ĉe unu el kiuj oni vidas la statuon de la eksreganto « Balley ».

Tiel, Konakri'o estos, post ne longa tempo, unu el la plej belaj urboj de la Francaj kolonioj de okcidentafrikaj bordoj ; same, kiam la fervojo, kiun oni konstruas nun, estos finata, tiu urbo iĝos tre grava komerca loko.

Efektive, la produktaĵoj de la Franca Gineo estas multaj kaj diversaj : arakidoj, palmobranĉa oleo, gumo kaj kaŭĉuko, orpulvoro, elefantosto, ledoj kaj feloj de bestoj, ĉiuspecaj lignoj, fruktoj, kopalto, kaj multaj aliaj produktaĵoj. Ili alveturas ĉiujare el la interno de la lando, kaj amasiĝas ĉe magazenoj de la

kontoroj en Konakri'o, alportitaj per karavanoj de multegaj sklavoj, kiuj bezonas nun unu kaj eĉ du monatojn por alporti tiujn komercajojn de la rivero Niĝer'o ĝis Konakri'o. Pro tio, kiam la fervojo estos tute finita, kiam tiuj komercajoj povos alveturi rapide al marbordo, sendube la enlanda komerco ekprenos novan ekflugon. Tio donos al la tuta kolonio grandegan agadon, kaj sekve, gravajn monajn provizojn por la komercistoj kaj por la kolonia publika tezoro.

Franca Gineo enhavas du grandajn ĉefajn rasojn : okcidente loĝas la Susu'oj, oriente la Fulah'oj aŭ Peuhl'oj. Estas ankaŭ multe da aliaj popoletoj : la Landuman, la Naln, la Bagas, k. t. p., kiuj elvenas el antikvaj popoloj nun tute ensorbitaj per la Susu'oj. Tiuj Susu'oj kiujn la Fulah elpelis el la Futa-Djalon, elvenas verŝajne el la centro de l' Sudano ; ili estas rimarkindaj pro la delikataj formoj de ilia korpo, ili havas lipojn malpli dikajn, kaj nazon malpli dispremitan ol aliaj popoloj de la nigra raso ; ili loĝas en dometoj konstruitaj per sekigita tero kaj bambuoj, tegitaj per tre alta konusa tegmento de palmaj kaj bananaj folioj.

La Susu'oj ĝenerale estas fetiĉistoj ; ili adoras kuriozajn idolojn, kies la kapojn finas papaga beko, kaj kiuj estas tute groteskaj. Ili havas sorĉistojn, kiuj, por plenumi iliajn diversajn ceremoniojn, vestas mokindan kostumon, konsistantan el jupo farita per herboj kaj stupo ; tiuj sorĉistoj kovras ilian kapon per granda masko, kies la vizaĝo estas simila je la longa kapo de l' krokodilo, kaj estas ruĝe kolorigata kaj ornamata per plumoj kaj zinkaj ladoj.

(Daŭrigota.) Grafo A. GALLOIS.

Réparation

D'APPAREILS PHOTOGRAPHIQUES

en tous genres

M. Louis LANDES, administrateur du journal se charge de la réparation de tous appareils photographiques.

S'adresser à l'imprimerie J Torrent, 57, rue d'Isly, les jours de semaine, jusqu'à 5 h. 1/2 du soir et, à partir de cette heure et les dimanches, à son domicile, 79, rue Michelet (sous-sol), Alger.

Le Gérant : Michel LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly

Lettres accent. de la Maison Turlot, Chaix et C^ie^, 128, rue de Rennes, Paris